

Partoprenos Kubo en eksterordinara kunsido de ministroj de la iberoamerika konferenco



Havano, nov 30 (RHK) La ministro pri eksteraj rilatoj de Kubo, Bruno Rodríguez, partoprenos hodia? en la eksterordinara kunsido de ministroj de eksteraj aferoj de la Iberoamerika Konferenco.

La? komuniko de la ministerio, la kunsido okazos virtuale sub la slogano Navigado por da?ripova evoluigo—Celo 2030. Iberoameriko fronte al la defio de la kronviruso.

Kiel parto de la insula delegitaro anka? partoprenos la unua vicministrino de ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Ana Teresita González, kiu respondecas pri la kunlaboraj programoj.

La? la retejo de la XXVII Iberoamerika Pintkunsido 2020, la ministroj pritraktos aferojn debatitajn en preparaj iter?an?oj kie elstaras la bezono pri komuna agado por batali la gravajn sekvojn sanitarajn, ekonomiajn kaj sociajn de la Covid-19.

Oni esperas ke la deklaro de la renkonti?o enhavu la ur?on doni “tutgloban kaj kunordigitan respondon al la nuna krizo, tiel ke la rekuperi?o estu inkluziva, da?ripova kaj resilienca”, aldonas.

Dum la pandemio, Kubo defendis tiujn poziciojn en diversaj internaciaj scenejoj kaj rekte kunlabora en la batalo kontra? la malsano per kuracistaj brigadoj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/241099-partoprenos-kubo-en-eksterordinara-kunsido-de-ministroj-de-la-iberoamerika-konferenco>



Radio Habana Cuba